V – 19563/ (1884)

# LA SKOLTA MONDO

ORGANO DE SKOLTA ESPERANTO-LIGO NR-0 1/94




**Raporto**
**p. 4–6**

Skolta Esperanto-Ligo

organo „La skolta mondo" fondita en 1918

**La Skolta Mondo**
ISSN 0037-6558
Oficiala organo de Skolta Esperanto-Ligo. Aperas per kvar numeroj jare.
*The magazine of the Scout Esperanto League.*
*Gazette de la Ligue Scoute Espéranto.*

**Prezidanto**
Franco Abriani, Via Falconetto 24, I 37131 Verona VR, Italio

**Ĝenerala Sekretario Kasisto**
David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool, Britio L22 3YE

**Redaktoro**
Anna Margareta Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, FIN 20720 Åbo/Turku, Finnlando, tel. +358-21-361 682. E-poŝto: ARITAMAKI@finabo.abo.fi
Telefakse kontaktebla post telefona interkonsento.

**Membrokotizo/Abonkotizo**
varias laŭlande. Informiĝu ĉe via nacia reprezentanto aŭ peranto. Se ne ekzistas tia por via lando eblas pagi rekte al SEL kotizon egalan al 20% de la UEA-kotizo MJ(T). Triobla Patrona kotizo rekomendata por plenaĝuloj.

**Kontoj**
Girobank plc, Bootle, Merseyside, Britio GIR 0AA, kontonumero: 29 572 8809. UEA-konto: selx-m. Paginte nepre ankaŭ informu la kasiston pri la pago kaj ĝia celo. En pluraj landoj ekzistas SEL-kontoj, kiujn prizor gas la nacia reprezentanto.

**Limdato por LSM 2/94**
La 13a de majo.

# Naciaj reprezentantoj kaj perantoj

**Aŭstralio:** S-ino Jennifer Dimo, 9 Rocky Gully Road, Coominya, QLD 43311, tel. (0)74-264299
**Aŭstrio:** S-ro Martin Bähr, Rasumofskygasse 2/26, A-1030 Wien
**Belgio:** S-ro Arie Bouman, Diesdreef 8, B-9030 Gent, tel. (0)9-227 48 41. Poŝtĝirkonto de SEL: 000-1646460-79.
**Brazilo:** S-ro Hiroshi Akamine, Uniao Dos Escoteiros do Brasil, Regiao do Sao Paulo, Rua Maquerobi 93, Placa da Arvore, Sao Paulo Cep 04053
**Britio:** S-ro David H. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE, tel. (0)51 928 2936
**Bulgario:** D-ro Inĝ. Ĥristo Mandev, bul. Mogilev 2 II 19, Gabrovo 5306, tel. +359-66-23647, Bankkonto: First Private Bank 945 076 990 107-0
**Ĉeĥio:** S-ro Pavel Sittauer, Hartmannova 1128, CS-67401 Trebiĉ, tel (0)618-21909
**Ĉilio:** S-ro Hector Campos Grez, Casilla de Correos 231, Curico, 7a Region
**Danlando (P):** S-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK 2600 Glostrup
**Finnlando:** S-ino Carola Antskog, Mattkärr, FIN 25700 Kimito, tel. (9)25-3133.
Bankkonto de SEL: Union Bank of Finland 243620-15822.
**Hispanio:** S-ro Luis Gilperez Fraile, Apdo Postal 7131, E 41080 Sevilla, tel.(labora) 95-4570849
**Hungario:** S-ro Aleksandro Pesti, Tó-u 20, H-6723 Szeged
**Italio:** S-ro Franco Abriani, Via Falconetto 34, I-37131 Verona VR
**Jamajko:** D-ro Arpad Ronai, P.O. Box 10, Kingston 8
**Japanio:** F-ino Fumiko Kamaĉi, 205 Rumieru Kishi, 6-21-5 Kokuryo-cho, Chohu, Tokyo 182
**Kanado:** S-ro U. Paul Ronald, 45 10th Ave, Roxboro Que, H8Y 2N3
**Kostariko:** S-ro Marvin Segura, Aptdo 1913 San Jose
**Malagasio:** S-ro Rog. Randrianekana, T.P. Box Postale 14, Ambatondrazake
**Nederlando:** S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, NL 1505 AA Zaandam tel. (0)75-166931
**Norvegio:** S-ro Hans Amund Rosbach, Skjaeret 17, N-3730 Skien
**Nov-Zelando:** S-ino G. Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1
**Srilanko:** S-ro Roland Peries, 4 Sri Vijaya Road, Colombo 6
**Sud-Afriko:** S-ro Henri W. Appel, T 59 Eddy House, 133 Ampthill Ave, Benoni 1500
**Svedio:** kiel Finnlando

# ENKONDUKE

## Kial ? - Tial!

### *Por trovo de la esenco de SEL.*

Kial Skolta Esperanto-Ligo?

Redaktante gazeton necesas demandi kial!

Per ĉiu numero mi volas kontribui al la respondo.

Skolta Esperanto-Ligo volas oferti ion al siaj membroj, al ĉiu unuopulo. SEL volas kontribui al la pliinternaciiĝo de la skolta movado.

Ne ĉiam SEL atingas multon. SEL ne povas multon oferti al ĉiuj siaj membroj. SEL nur malrapide povas pliinternaciigi la skoltan movadon.

Do necesas plu demandi: Kial Skola Esperanto-Ligo?

En tiu ĉi numero vi povas legi pri la internacia SEL-tendaro Skolto '93. Ĉi-jare laŭplane okazos denove simila tendaro. Formiĝas tradicio. Skolta Esperanto-Ligo estas trovanta sian spiriton. Ne necesas ke ĉiu vojaĝu por sperti internaciajn kontaktojn pere de SEL. SEL peras kontaktojn kaj ideojn ankaŭ perpoŝte. Sed estas klare ke internacia SEL-tendaro estas la pinta manifestiĝo de la agado kaj celoj de SEL.

La esenco de skoltismo troviĝas proksime de naturo en amika estoso - en momentoj de skolta tendaro. La esenco de Esperantismo troviĝas en interkultura kompreniĝo - en momentoj de internacia renkonto. Kiam ni kapablas realigi la kunligon de tiu ĉi du ni travivas ion eksterordinaran.

Konsiderante la ekziston de internaciaj SEL-tendaroj mi sentas ke sufiĉas respondi: Tial. SEL sukcesas kunligi la esencojn de skoltismo kaj Esperantismo. SEL atingas ion vere valoran. Ankaŭ redakti gazeton de SEL ne estas senvalore!

Tial Skolta Esperanto-Ligo!

Sincere via

## Raporto de la SEL-tendaro Skolto '93

# Varia programo kaj superba nepriskribebla etoso



De la 3a ĝis la 13a de aŭgusto en Ĉeĥa respubliko, en la regiono de Opava, okazis la Skolta Esperanto-Tendaro SKOLTO 93. La tendarejo situis en belega montara naturo, en rivervalo de Moravice, tradicia loko de skoltaj kaj esperantoskoltaj tendaroj.


La organizantoj estis viglaj SEL-anoj el Belgio kaj Ĉeĥio, inter aliaj gesinjoroj Marlene kaj Arie Bouman kaj sinjoroj Jan Piŝala kaj Jiri Caletka.

### Partoprenantoj de kvin landoj

Al la loko alvenis ĉirkaŭ 35 geskoltoj el kvin eŭropaj landoj: Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Pollando kaj Rusio. Ilin atendis belega vetero kaj tre simpatiaj skoltestroj. Domaĝe ne alvenis gastoj el Nepalo kaj la ceteraj kiuj alsendis la aliĝilon

Ni ĉiuj laboris laŭ pli frue fiksita, tre varia programo. Ĉiun matenon ni komencis per matengimnastiko, post kiu estis apelo kun flaghiso.

La lecionoj de Esperanto plejparte efektiviĝis matene tuj post la matenmanĝo, aŭ posttagmeze. Ni lernis novajn Esperantokantojn per akompano de gitaro.




*La plej junaj ĉeĥaj geskoltoj. (sendis J.T)*

### Ne mankis interesaj programeroj

Ni ankaŭ ekskursis - al Opava, al la romantika ruino de Vikŝtejn (ĉiutaga migrado tra montetoj), al Hradec nad Moraviĉi, kie ni vizitis la kastelon kaj partoprenis meson en tiea preĝejo kaj al la montaro Jeseniki.


Ni ankaŭ partoprenis spuradon en la ĉirkaŭaĵo de la tendaro, lernis nodfaradon kaj dum unu el la ekskursoj estis



*Flaghiso kaj apelo. Ambaŭflanke SEL-flagoj, blanka SEL-flago produktita en Belgio kaj nova flago en formo de Esperanto-flago kun la insigno de SEL en la loko de la stelo. (Jiri Caletka)*




*Partoprenantoj dum ekskurso al montaro Jeseniki. (J.T)*



*Estroj dum vespera babilado (J.C)*

ebleco veturi per kajakoj laŭ rivero.

En proksimeco de la loko, kie ni restadis daŭris ankaŭ aliaj tendaroj, inter aliaj - pafista, kie ni provis nian trafan okulon.

Ĉiutage sur nia ludejo ni organizis kelkajn matĉojn de retopilko kaj kvankam la teamoj estis miksitaj per fremdlingvaj amikoj ne ĉiuj bonparolantoj de Esperanto ni interkomprenis nin bonege. Tiuj ludoj aldonis al ni multe da ĝojo kaj emocioj.

**Bonega manĝaĵo**

Ĉar la vetero estis tre bela kaj la tagtemperaturoj tre altaj, se nur estis iomete de libera tempo ni elkuradis el la tendaro al apuda malvarma rivero. Post banado agrable estis pripensi pri tio, ke en tendaro atendas nin jam preta tre bonĝusta manĝo. Pri niaj stomakoj oni zorgis speciale - dum ĉiu tago ni ricevis 5 manĝojn. Dank al niaj prizorgantoj ni ekkonis ege interesajn ĉeĥajn pladojn.

**Multaj vizitantoj**

Nin tre ofte vizitis multaj homoj - fama bardo Georgo Handzlik kun sia edzino - organizanto de

pasintjara tendaro en Slovakio, ĉeĥaj geesperantistoj kaj eĉ homoj ne sciantaj Esperanton. Ankaŭ en ĉeĥa gazeto Naŝe Opavsko aperis artikolo.

Ni invitis kaŭntri-muzikgrupon, kiu ludis antaŭ nemalmulta publiko ankaŭ de la aliaj tendaroj. Ni kune kun la artistoj kantis kaj dancis. Estis multe da rido kaj bona amuzo.

Kompreneble ankaŭ ne mankis vesperaj tendarfajroj kaj noktgardoj. Ni ofte ankoraŭ ĝis malfrua horo varmiĝante ĉe kampkuireja forno babiladis kaj kantis.

**Bonvenon al Skolto '94**

Mi volas danki al la organizantoj kaj partoprenantoj pro tiel simpatio pasigita tempo kaj saluti ilin ĉiuj.

Vere, ne ekzistas maniero por priskribi sur paĝo de papero kiel superba etoso kreiĝis inter ni. Tion oni devas travivi mem. Tial mi volas instigi ĉiujn veni al la sekva tendaro, Skolto '94, kiu laŭplane okazos en la sama loko en julio 1994.

Ĝis la revido!

*Joanna Tarasewicz, Pollando*

# Kalendaro

Jene estas listo de skoltaj aranĝoj pri kiuj informis nin niaj Naciaj Reprezentantoj kaj elektitaj Esperanto-aranĝoj, kiuj laŭ la sperto de la redaktoro estas rekomendindaj. La adresoj de la Naciaj Reprezentatnoj (NR) troviĝas sur paĝo 2.

**1-8.5 Trans la limoj de Eŭropo - la eŭropa kontribuo en la hodiaŭa mondo**, TEJO-seminario en la Eŭropa Junulara Centro, Strasburgo, Francio. Unu de la plej altkvalitaj aranĝoj de la Esperantomovado, 35 lokoj, vojaĝkostoj repgataj, unuavice por ĝis 30-jaraj eŭropanoj, individuaj membroj de TEJO. Lusie Koreŝová, Ylova 1262, 50801, Hirocev, Ĉeĥio.

**21-23.5 INTERCAMP 94, Ĉeĥa respubliko,** Sycherak ĉe Tachov, proksimume 20 km de la Germana landlimo. SEL planas informstandon. Kontaktu Michala Rocmanova, Terronska 5, 16000 PRAHA.

**27.6-15.7 Someraj Esperanto-kursoj en la universitao de San-Francisko,** altnivelaj, ĉiunivelaj kursoj de Esperanto. Menciante ke vi legis pri la kurso en La Skolta Mondo vi povas peti stipendion kiu pagos la kurskotizon. Informoj de Cathy Schulze, 410 Darrel Road, Hillsbourgh, CA 94010, (415) 342-1796

**Julio SKOLTO ´94, Opava, Ĉeĥio,** informas Jiri Caletka.75601 OPAVA, Na nábrezí 11,Ĉeĥio

**15 21.7 Internacia Junulara Semajno**, Köszed, Hungario. Adreso: pk 87, H-1675 Budapest, Hungario.

**23 -30.7 Universala Kongreso de Esperanto**, Seulo Koreio. Informas Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. *kun SEL-kunsido*

**26.7 - 4.8 "International Outback Adventure" (Aŭstralia Centro-de-la-lando-aventruo), Alice Springs, Centra Aŭstralio**. Pliaj informoj aperis en La Skolta Mondo 4/93. Kontaktu Jennifer Dimo, NR por Aŭstralio.

**28.7-8.8 Ekologia turista ekspedicio Strjama-Ĉapelarska.** Aranĝas Skolta Turista Klubo, Bulgario, 5300 Gabrovo, p.k. 8 aŭ tel. Ĥristo Mandev +359-66-23647.

**30.7 -6.8 Internacia Junulara Kongreso,** Chonan, Koreio: Informas Universala Esperanto-Asocio, adreson vidu supre.

**1-10.8 Europa Ĵamboreo, Dronten, Nederlando**, ĉ. 10000 partoprenantoj, por 11-14-jaraĝaj geskoltoj kaj estroj. Skolta Esperanto-Ligo partoprenos per informstando kaj ludo. Kvar geskoltaj grupoj kiuj rilatas kun SEL planas partoprenon, de Ĉeĥio, Francio kaj Italio. En la sama loko samdate okazos la Mondĵamboreo 1995. Por pliaj informoj kontaktu Arie Bouman, NR por Belgio.

**10-20.8 Rusa ĵamboreo apud Sankt-Peterburgo, Ruslando.** Pri ebla kontribuo de Esperanto kontaktu Rusajn Esperantistojn: RU-143006 Odincovo, Mosk. obl., a/k 111, Esperanto, Andrej Ananjin.

# ETAJ NOTOJ

## SELSLOV ekzistas kaj aktivas





*La oldskoltoj de Bratislava salutas per poŝtkarto.*

*En la numero (1-)2/93 de La Skolta Mondo ni raportis pro SEL en Slovakio laŭ informoj de la gazeto Eventoj. Nun ni ricevis leteron pri la aktivaĵoj de SELSLOV, la Slovaka SEL de Inĝ. Miroslav Havranek = "Ripo".*

La jubileaj numeroj de La Skolta Mondo ĝojigis ne nur min, sed ĉiujn partoprenantojn de la "Nikolaa" kunveno de la oldskoltoj en Bratislava, ĉar la sendaĵon mi ricevis rekte dum la renkontiĝo de la klubo, kadre de kiu la Skolta Esperanto-Ligo en Slovakio estas en la ĉefurbo Bratislava organizita. SELSLOV estas registrita ĉe la ministerio de la Slovaka Respubliko kiel sendependa organizo. Kontakta adreso estas mia privata adreso Inĝ Miroslav Havránek, Plzenská 7, SK-831 03 Bratislava sed oni ankaŭ povas uzi la adreson de la oldskolta klubejo Leŝkova 16 (ne 14 kiel aperis en LSM), SK-81104 Bratislava.

En 1992 mi vizitis la SEL-tandaron en Slovakio kaj tie havis la unuajn kontaktojn kun la sekretario de SEL kaj aliaj aktivuloj, sed mi ne ricevis La Skolta Mondo kaj do ne povis rekte informi pri niaj aktivaĵoj. Ni anoncis niajn aktivaĵojn en Eventoj kaj en la eĥa organo Starto, sed bedaŭrinde venis neniu reeĥo.

Mi povas prizorgi relative malmultekostan viziton de geskoltoj sur sufiĉe alta kultura nivelo al Slovakio.

Ankoraŭ mi volas infomri pri la ĝisnunaj aktivecoj de SELSLOV. Dum la pasintjara kongreso de Slovaka Skoltismo Slovensky Skauting estis akceptita la decido, ke la skoltoj uzu por la internacia komunikado la internacian lingvon Esperanto. En la centraj kursoj por la skoltaj gvidantoj estu informoj pri Esperanto. En la somera centra arbara lernejo de Slovaka Skoltismo mi prelegis al la kursanoj pri Esperanto. La ĉefaj geestroj de la organizo estis miaj gastoj dum la Universala Kongreso en Vieno 1992 por travivi la kongresan etoson.

### 75-jara SEL salutis la Skoltan Mondkonferencon

Skolta Esperanto-Ligo sendis saluton al la Monda Skolta Konferenco en Bankoko, Tajlando, somere 1993. La Brita partoprenanto kun kiu ni sendis la salutle-

teron persone transdonis ĝin al la prezidanto de la konferenco, kaj li supozas ke ĝi estis laŭtlegita eĉ se li ne mem sekvis la kunsidon ĝuste tiam.

La konferenco decidis elekti Ĉilion la lando de la 19a Monda Ĵamboreo, 1999. Por la ĵamboreorganizado kandidatis ankaŭ Indonezio.

### "Skoltado por knaboj" tradukata

*Hector Campos Grez, NR por Ĉilio, tradukas la unuan skoltan libron en Esperanton. Li skribas:*

Okazis grava prokrasto pri "Skoltado por knaboj" pro komputila viruso, kiu fuŝis la tuton. Feliĉe mi havas kelkajn manuskriptojn de ĝi kaj daŭrigos la laboron.

Mi jam finis tradukon de "Idearo de B.P.", kiu enhavas pensojn kaj eldirojn de Baden-Powell pri diversaj temoj. Mi serĉas kunlaborantojn por lingve korekti ĝin por ebla posta eldono aŭ proveldono. Preskaŭ preta estas la traduko de "La Patrolsistemo", kiun mi komencis dum mia redaktoreco de La Skolta Mondo. Ankaŭ por ĝi necesas lingva plibonigo.

### Sukcesa SEL-tendaro en Francio

Pasintnumere ni informis pri la Grupo Lumo de Aŭvernio en Francio, kiu uzas Esperanton por siaj internaciaj kontaktoj. Somere 1993 ili okazigis internacian tendaron. Bedaŭrinde ni ne ricevis raporton de la tendaro, sed jes informojn ke la tendaro bone sukcesis, interalie kun partopreno de Ĉeĥa SEL-grupo. Ĉi-jare la franca grupo planas partopreni la Eŭropan Ĵamboreon.

### Okazis vintra Esperanto-tendaro en Bulgario

Dum la vintra ferio de la 28-a de decembro ĝis la 7a de januaro la skolta turista klubo de Gabrovo, Bulgario gastigis la unuan skoltan Esperanto tendaron.

Gabrovo estas industria urbo situanta proksime al la geografia centro de Bulgario. La urbo troviĝas ĉe la rivero Jantra fluanta en la valoj de la proksimaj nordaj deklivoj de la Balkana montaro Stara planina. La Gabrovanoj estas konataj pro sia ŝparemo kaj ekzistas pri ili multaj ŝercoj. Gabrovo tiel fariĝis la unua ĉefurbo de ŝercado. En la urbo troviĝas la Domo de la humuro kaj satiro kaj en majo oni organizos mondan bienalon pri humuro kaj satiro.

Venis grupo de gelernantoj el la rusa urbo Ivanovo kaj partprenantoj el la bulgaraj urboj Gabrovo, Ruse kaj Kazalak por partopreni la renkonton. La gejunuloj havis eblecon lerni Esperanton, promenadi kaj ekskursi en proksima parto de la montaro. Ankaŭ ili festis la Novjaron en tre agrablaj, netradiciaj kondiĉoj. Al ili mankis nek la kuko kun kornusaj burĝonoj por bonŝancoj, nek la rusa ŝampana vino, nek la dolĉaĵoj. Ankaŭ ili havis novjaran fajron ĉirkaŭ kiu ili kantis esperantajn kantojn. Al la fino de la renkontiĝo ĉiuj partoprenantoj gastis en la etnografia kultura komplekso "Etâra" kaj vizitis en la Domo de la Humuro kaj satiro. Ili estis invitataj al la Ekologia eskpedicio laŭ la riveroj Strjama kaj Ĉepalarska dum julio-aŭgusto.

*Ĥristo Mandev*
*la ĉefa organizanto*
*de la renkontiĝo*

### SEL Belgio: Kursoj kaj membrotagoj

SEL Belgio denove aranĝis rapidkursojn per la lernolibro Ĵamborea Lingvo en Tienen kaj Halle. En Tienen, kie jam ekzistas aktiva SEL-grupo La Hirundo, partoprenis 20 personoj naskitaj inter 1974 kaj 1980, inter ili unu skoltino. En Halle formiĝis nova SEL-grupo La Verda Joepiej kaj partoprenis 7 kursanoj 14-17-jaraj, ankaŭ inter ili nur unu skoltino. La partoprenintoj deziras korespondi. Skribu al Arie Bouman, Driesdreef, B-9030 Gent, kiu estas Nacia Reprezentanto de SEL por

Belgio. Li plusendos vian leteron au sendos al vi la adresojn.

Dimanĉe la 15an de majo 1994 okazos membrotago de SEL Belgio. Ĉiuj skoltoj estas bonvenaj. Por pliaj informoj kontaktu Arie Bouman. Pasintjare ankaŭ okazis membrotago kaj dum ĝi la partoprenantoj inter alia faris petskribon por pli efika informado pri Esperanto al la ministroj de edukado en Belgio

**Fakinsigna felietono de Finnlando (tria parto)**


En du antaŭaj numeroj de La Skolta Mondo ni raportis pri niaj strebadoj enkonduki Esperanto-fakinsignon en Finnlando kaj la postaj planoj enkunduki lingvo-fakinsignon por kiu kompreneble ankaŭ eblus uzi Esperanton. La afero ne finiĝis per tio. En la lasta decida komitato oni forigis ankaŭ la lingvo-fakinsignon! Kompreneble ni protestis, unuavice ĉar la renovigita skoltprogramo, laŭ ni, tute ne respegulas la pliinternaciiĝon de la skolta movado kaj ne substrekas la edukadon al internaciismo. Ni ricevis tre subtenan, bedaŭrantan leteron de la komitatestro kie li substrekas ke la programo estas formulita tia ke eblas evoluigi ĝin kaj forigi kaj enkonduki novajn fakinsignojn poste. La unuan fojon oni planas fari tion antaŭ la granda Finnĵamboreo en 1996. Nu, eble ni provu tiam...


Kaj, cetere, ni ankaŭ povas raporti pri historia ekzisto de Esperanto-fakinsigno en Finnlando. Unu de niaj membrinoj trafoliumante la arkivojn de sia trupo trovis la regulojn de ĝi kaj du tiaj insignoj ni trovis sur la muro de la skolta muzeo en Turku.

*AMo*

# Enigmoj


La enigmoj estas senditaj de Barabara Pierchala, Pollando.





1. Dividu la figuron por ricevi el la formitaj pecetoj kvadraton.

2. Transprenu tri alumetojn kaj butonon por ke la fiŝo naĝu en la kontraŭan direkton.



3. Transmetu du alumetojn kaj aldonu ankoraŭ unu por ricevi du rombojn.

4. Du homoj iris kaj trovis tri najlojn. Postsigne kvar iros. Kiom da najloj ili trovos?

5. Flugis tri anseroj: unu en la komenco kaj du en la fino, unu en la fino kaj du en la komenco, unu inter du kaj tri en la vico. Kiom da anseroj flugis?

6. En familio estas kvin fratoj. Ĉiu el ili havas fratinon. Kiom da infanoj estas en tiu familio?


Respondoj en la sekva numero.

# ĴAMBOREA LINGVO

*En skoltaj renkontiĝoj, kie ni parolas Esperanton ni bezonas skoltajn vortojn. Tiajn ni trovas abunde en la lernolibro de SEL „Ĵamborea Lingvo" - kiu donis la nomon al nia rubriko - kaj en la „Skolta kaj tenduma terminaro", ambaŭ libroj verkitaj de J. K. Hammer. Tiujn du librojn ankaŭ ni konsultas dum ni preparas por vi etajn skoltlingvajn ekzercojn en La Skolta Mondo.*

## Nodoj

Kunligu la nomojn de la nodoj kun ilia aspekto kaj uzo.




### La respondo al la Ĵamborea Lingvo-tasko de la numero 3/93:

1. En ĉambro tute mallu**ma li o**kazigis spiritisman seancon. (Malio) 2. Ili volis ŝte**li bio**logiajn librojn el la lernejo.(Libio)
3. Ĉu bendo ne estas presk**aŭ strio** aŭ almenaŭ simila? (Aŭstrio) 4. Tion **ĉi ni o**rdonas al vi, faru! (Ĉionio) 5. Se ne est**us**
***on, obl*** kaj *op*, kiel esprimi numeralojn, ekzemple 1/2? (Usono) 6. Piedpil**kon golo** bezonas. (Kongo, kiel respondis ĉiuj
aŭ Kongolo laŭ la rekomendolisto de la Akademio de Esperanto) 7. K**airano** loĝas en Kairo. (Irano) 8. La saĝa formiko
kaŝis sin su**b razilo**.(Brazilo) 9. Al la knabino grave vund**ita li o**feris naztukon. (Italio) 10. Nek supran nek in**fran**
**Ci**onismon mi iam akceptos. (Francio) 11. Ili kriis**: Ve, dio**j! Ve, dioj! (Svedio) 12. La brile blan**kan ado**rejon ŝi solene
eniras. (Kanado 13. Tiom ma**gre, kio**m li pezas. (Grekio) 14. Por nia kaporalo, k**orusu jo**viale kaj kantu ege laŭte!
(Rusujo) 15. Estas do pli bone, ke vi morgaŭ ĉi tie a**peru, o**l ke vi iru al viaj fiamikoj. (Peruo)

**Al la konkurso venis 12 respondoj**, 6 de Ĉeĥio, 2 de Finnlando kaj po 1 de Svisio, Belgio, Bulgario kaj Danio. **La kantaron "Verda trobadoro" gajnis Váslav Pecák, Ĉeĥio.** Váslav tiom entuziasmiĝis pri la gajno ke li danke sendis priskribojn pri kelkaj skoltaj ludoj kaj daŭrigon al la landnoma enigmo. Tiuj aperos en iu sekva numero de La Skolta Mondo. Dankon! AMo



Pere de la Anonctabulo en La Skolta Mondo vi atingas geskoltojn en la tuta mondo. La Anonctabulo peras korespondkaj interŝanĝpetojn, diversajn informojn kaj alvokojn, vendo- kaj aĉetoofertojn... Uzu ĝin!

# ANONCTABULO

### Korespondi deziras

La skoltoj de la Belgaj kursoj volas korespondi. Rigardu sub Etaj Notoj

### Jubileinta SEL dankas...

...pro ĉiuj gratulleteroj kaj mencioj en la Esperanta gazetaro!

### Malnovaj numeroj de LSM riceveblas

J.K. Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam, Nederlando havas duoblajn ekzempleroj de la sekvaj numeroj de La Skolta Mondo. Li sendos ilin laŭ peto. Se ne restas ekzemlero de la petita numero li ne avertos, sed vi simple nenion ricevos. Indikoj: numero jaro jarkvarono a, b, c, d.
**Volumo III**, 1961-68: 17 1966b, **Volumo IV**, 1969-75: 12 1971d, - 14 1972b, - 24 1974d, 26 1975b, - 27 1975c, **Volumo V**, 1976-80: 4 1976d, - 14 1979b, **Volumo VI**, 1981-87: 1980c, - 1981a, - 1983a, b, c, d, -9 1990a, 10 1990b - 11 1990d

### La vorto skolto

Bernard Golden, Hungario, kiu reagis pro informo pri la jubileo de SEL, havas du demandojn:
1. Kiu unua uzis la vorton skolto?
2 Ĉu eblas scii de kiu lingvo la vorto venas? Se vi havas komentojn responde al la demandoj sendu ilin al La Skolta Mondo.

### Nova adresregistro

SEL preparadas novan adresregistron kiu nun ebligas facilan ĝisdatigon. Ĝin prizorgas la redaktorino. Nature troviĝas multaj eraroj. Ni petas vin sendi korektojn!

### Ĉu vin interesas ŝako?

Vladimir Kondirev, do vostrebovanija, 690049 Vladivostok-49, Rusio, serĉas personojn en ĉiuj landoj por ebla internacia infana ŝakfestivalo.

### Kasedo kun himno de la 19a Monda Ĵamboreo kaj lingvokontrolantoj

Hector, NR por Ĉilio ofertas interŝanĝe (60' kasedo) kasedon kun la himno de la 19a Monda Ĵamboreo kaj ĉiliaj skoltaj kanzonoj kun tekstoj. Hectror ankaŭ serĉas lingvokorektantojn por liaj tradukoj de skoltaj libroj. Vidu sub Etaj Notoj.

a.s. OPAVA

PRVNÍ SLEZSKÁ BANKA

---

# UNUA SILEZIA BANKO

*Ofertas nuntempe sekvajn servojn:*

- *financajn konsilojn*
- *internacian pagan kontakton*
- *Unua Silezia Banko subtenas la tendaron SKOLTO kaj la agadon de SEL en Opava*

---

*Kontaktadreso: Prvni slezská banka, a.s.*
*Jánská 4*
*CZ–746 01 Opava*
*Ĉeĥa respubliko*
*Telefono: +42–653–21 88 68*
*Faksilo: +42–653–21 23 02*

KUL